n-ro 81

julio 2003

# La Merkato

ISSN 0941-9306

## Universala Kongreso en Gotenburgo

Dum la Universala Kongreso en Gotenburgo IKEF planas sian jaran ĝeneralan kunvenon, prezenton de IKEF en budo dum unu tago kaj viziton al komerca altlernejo. Je redaktofino la datoj ne estis konataj. Mi laŭeble rapide komunikos ilin al interesitoj.

Roland Rotsaert, ikef(a)pandora.be

## Aldonoj

Por la membroj, al ĉi tiu numero estas aldonita aktuala membrolisto. Membroj kiuj akurate pagis sian kotizon por la nuna jaro krome trovos en la koverto eseon de IKEF-kunfondinto Lawrence Mee pri la Stelo (kiel anoncite en LM79, p. 3). Tiu eseo ankaŭ estos legebla je www.ikef.org, kiel kromnumero *81 bis* de la revuo.

## Enhavo

Novaj membroj - novaj adresoj . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 3
Komercaj petoj kaj proponoj . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 4
Anoncitaj aranĝoj . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 5
Terminologio . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 7

**La Merkato** (LM) (ĝis numero 26: *Laŭokaza Novaĵletero*) estas revuo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare (jan-apr-jul-okt) kaj servas al la membraro kiel komunikilo. Redaktoro: Roland Rotsaert. Limdato: mezo de la monato antaŭ apermonato.

**Estraro de IKEF**: S-ro Franz Josef Braun, Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario; S-ro Roland Rotsaert, Financa Konsilanto; S-ro François-Xavier Gilbert; S-ro Zoltan Könyves; D-ro Rainer Kurz; Prof. Ooba Atsua; S-ro Wang Tianyi

**Revizoro por la financa raporto**: D-ro Gianfranco Polerani.

**Centra sidejo**: Ĉe s-ro F.J. Braun, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl, Germanio.

**Financa sidejo kaj membrara administrado**:
Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio,
telefono/fakso/respondilo: +32-50-330004; retpoŝto: roland.rotsaert(a)pandora.be.

La jara **membrokotizo** estas 15 eŭroj (EUR) por landoj laŭ UEA-kategorio 'A' ('riĉaj landoj') kaj 10 EUR por landoj laŭ UEA-kategorio 'B' ('malriĉaj landoj'). Tarifo por komuna membreco de IKEF kaj TAKE: 27 EUR (kat. A) aŭ 18 EUR (kat. B) jare. Egalvaloro en konverteblaj valutoj (ekz. usona dolaro - USD) kaj internaciaj respondkuponoj (IRK - kun stampo de eldoninta poŝtoficejo) estas akceptata. Kurzoj estas proksimume 1 EUR = 1 USD = 1,20 IRK. Dumviva membreco akireblas per unufoja pago egalvalora al 20-obla membrokotizo. Por pago per kreditkarto kaj/aŭ aŭtomata jara pago sendu instrukcion al Flandra Esperanto-Ligo (FEL). Membroj kiuj aliĝas meze de la kalendara jaro pagu 1,5-oblan kotizon (t.e. por 18 monatoj).

**Kontoj**:
- ĉe UEA kaj FEL: kodo *ikef-c*
- belga poŝtĉekkonto: n-ro 000-1592629-83 (IBAN: BE14 0001 5926 2983, BIC: BPOTBEB1)

**Perantoj**

*Internacie*: Flandra Esperanto-Ligo (fakso +32-3-233.54.33, retpoŝto financoj(a)fel.esperanto.be)

*Ĉinio*: S-ro WANG Tianyi, Xi'an Jiangong-lu 3, CN-710043 Xi'an, telefono + fakso 0086-29-2232952, retpoŝto komerco(a)public.xa.sn.cn

*Francio*: S-ro François-Xavier GILBERT, 33, rue Louvière, F-55190 Void-Vacon (CCP 1275-89 L Nancy), telefono kaj fakso +33(0)3.29.89.82.15, retpoŝto efikso(a)aol.com

*Germanio*: S-ro F. J. BRAUN, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400), telefono +49-7223-942064, fakso 942065, retpoŝto f.j.braun(a)t-online.de

*Hungario*: D-ro GETHER István, Berenyi u. 8, H-1016 BUDAPEST, retpoŝto istvan.gether(a)office.ksh.hu

*Italio:* D-ro Gianfranco POLERANI, Viale G. Suzzani 2, I-20162 Milano, retpoŝto g.polerani(a)tiscalinet.it (poŝta konto 37485208)



*Japanio*: S-ro YAMASAKI Seikô, J-185-0014 Tôkyô, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12, retpoŝto syama(a)qf6.so-net.ne.jp (pĝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 2000 enoj)

IKEF-informoj en Interreto: www.ikef.org aŭ http://users.pandora.be/ikef/

## Novaj komercaj retlistoj ĉe Yahoo

Pro teknikaj kialaj, ne plu eblas mastrumi la liston per-esperanto-komerco. Ni invitas interesitojn malaliĝi de ĝi kaj anstataŭe aliĝi al novaj listoj, pri kiuj informoj aperas je p. 8 de ĉi tiu revuo.

fabriciovalle(a)redeesperanto.org.br - efe(a)redeesperanto.org.br

## Vidbendo Selten

En antaŭaj numeroj de La Merkato jam estis menciita la vidbendo sur kiu estas registrita intervjuo kun nobelpremiita profesoro Selten. La bendo daŭre estas pruntepreneblа ĉe la prezidanto de IKEF, sed ĝi nun ankaŭ estas aĉetebla kontraŭ pago de 10 eŭroj.

## Familio Ledon

La numero 106 (januaro-aprilo 2003) de 'La Lampiro', revuo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo (lampiro(a)ig.com.br) estas grandparte dediĉita al Symilde kaj Gilbert Ledon.

## (Re)aliĝoj

168. S-ro João Otávio VEIGA RODRIGUES, Rua Alvarina Frota Nº 214 - Jardim Sant Luíza, BR-37026-670 VARGINHA (MG, Brazilo, rete jveiga(a)uai.com.br

325. S-ro Fabrício VALLE, SRTVN - Ed. Brasília Rádio Center, Sala 2142, 70719-900 Brasília-DF, Brazilo, fabriciovalle(a)redeesperanto.org.br

## Novaj (ret)adresoj

7. D-ro Istvan GETHER, Hungario, retadreso istvan.gether(a)office.ksh.hu

183. HUANG Zhengsu, Room 603. 1 Building. No. 87, Mengcheng Rd. CN-230069 HEFEI; rete auet6(a)mail.hf.ah.cn

229. S-ro Gaston HOUSSOU, B.P. 02, BJ-LOKOSSA, Benino, ikuegaston(a)yahoo.fr

302. CHEN Jinyin, Ĉinio, retadreso deichenquanliao(a)sina.com



**Komercaj petoj kaj proponoj**

Brazilo

Mi reprezentas firmaon pri kafa komerco (kruda kaj grajna kafo) el Varginha, provinco de Minas Gerais, Brazilo. Ĝi jam komercas kun Usono, Polio kaj aliaj landoj ekde kelkaj jaroj, per angla lingvo. Nun ĝi deziras komerci per Esperanto. J.O. Veiga Rodrigues, rete bluacielo(a)bol.com.br.

Bulgario

Nemoveblaĵoj (domoj, apartamentoj, terparceloj por agro- kaj konstruceloj, hoteloj, bankuracejoj, ktp.) en Bulgario kostas de tridek gis kvindek fojojn malpli ol aliloke. Saĝaj homoj aĉetas nun, ĉar post kelkaj jaroj la prezoj plurobliĝos. Sofio estas preta helpi vin. Lasto Nikov, tel.: + 359 2 983 50 84 , 31 88 40, GSM + 359 087 303 427, rete lasto11(a)yahoo.co.uk, lasto(a)mail.bg.

Ĉinio

PET-bendo (Polyester Plastic Steel Tape) povas anstataŭi la tradician ŝtal-bendon por diversaj varoj kaj havas vastan praktikon en la pakumo. Nun ni vidas prez-diferencon inter Ĉinio kaj aliaj landoj. Tio donas al ni komerceblon. Dir. Ĉielismo (WANG Tianyi), Xi'an Verdstela Komerca Kompanio, Jiang-Gong-Lu 8, CN-710043 Xi'an, tel.: +86-29-2242215, fakso: +86-29-2232952, rete: informo(a)komerco.com, komerco(a)public.xa.sn.cn, esp(a)pub.xaonline.com.

Mia urbo tre bezonas teknik-laboristojn, kiuj bone konas cigaredo-maŝinojn. Spertulojn ni povas tute senpage akcepti por labori. Venkon, rete venkon(a)public.nc.ĵ.cn, Nanchang, Jianĝi.

Mi volas scii informojn pri kafo-aparatoj. Eble ni povas kunlabori en kafo-komercado. Kontaktu: s-ron Sun Mingxiao, Wenhua Zhong Lu 81 Hao, Zaozhuang, Shandong, Cxinio. CN_277102, rete semio(a)zz-public.sd.cninfo.net.

Rusio

Nia Esperanto-societo estas plej olda en la mondo (111jara). Mi alparolas ĉiujn por subteni nin finance, por ke ni povu aĉeti nian klubejon. Ankaŭ estas propono esti nia partnero por aranĝi hotelon. Ĉi-jare nia urbo festas sian 300jariĝon kaj abundas turistoj. Do, estas tre perspektiva afero. Interesitoj bonvolu turni sin al Anna Butkevich, prezidanto de Sankt-Peterburga Esperanto-Societo "Espero", espe(a)narod.ru, tel./fakso : +7(812)2344759.

Se vi pretas uzi Esperanton ne nur en via E-klubo aŭ dum E-renkontiĝo sed ankaŭ en via profesio, enlistigu vian firmaon, universitaton, lernejon, ktp. en liston de firmaoj Esperante parolantaj. Tio permesos al vi trovi kolegojn en samfakaj firmaoj kaj uzi Esperanton profesicele. La liston vi trovos en www.comail.ru/~esperanto/servocentro en koncerna rubriko. Mikaelo CHERTILOV, mikaelo(a)km.ru.

**Anoncitaj aranĝoj**

**EKOTUR 2003**, Ekoturisma Renkontiĝo en Karlstejn, Ĉeĥio, 12-18 julio 2003
**OSIEK-konferenco 2003**, Prago, Ĉeĥio, 19-25 julio 2003, temo 'intimaj rilatoj'.
Informoj: KAVA-PECH, chrdle(a)kava-pech.cz, www.kava-pech.cz.

**Utiligo de Esperanto en Komerco, Turismo kaj Interhomaj Rilatoj**, Sofio, Bulgario, 9-11 oktobro 2003. Kontaktadreso: Centro Espero, p.k. 94, BG-1373 SOFIO 73, rete centroespero(a)hotmail.com. **Rigardu pli detalajn informojn en la rubriko "komercaj anoncoj" de www.ikef.org**.

**3-a Taĝikia Tutlanda Kongreso**, Dushanbe, ĉefurbo de Taĝikio, 4-14 oktobro 2003.
Kongresejo: Taĝikia Ŝtata Universitato
Programoj: prelegoj, seminarioj, kursoj por komencantoj, naciaj kantoj kaj dancoj, turismado, bankedo ktp.
Aliĝkotizo: 50 USD (inkluzivas transporton inter hotelo-kongresejo kaj bankedo).



Loĝado en studenta loĝdomo: 5 USD por unu nokto. Manĝaĵo: 5 USD por unu tago. Loĝado en hotelo: 30-50 USD por unu nokto. Manĝaĵo: 20 USD por unu tago. Informoj: vajsidin(a)cada.tajik.net.

**Ĉina Radio Internacia**

Ĉina Radio Internacia ekde unu jaro ankaŭ estas aŭskultebla tra interreto; iru al http://esperanto.cri.com.cn/esperanto/index.htm kaj elektu la eron 'surlinia aŭskultado'. Korespondadreso: ĈRI, Esperanto Redakcio, CRI-36, pk. 4216, CN-100040 Ĉinio, rete espradio(a)cri.com.cn.

**Virtuala UK 2003 por nekongresanoj**

La ĉijara 88a Universala Kongreso, okazonta en Gotenburgo, Svedio, funkciigos ankaŭ t.n. virtualan kongresejon, en kiu nekongresanoj povos sekvi la laborojn de la kongreso lege, bilde kaj aŭde. Tio estos la unua klopodo, tial pionira. Krom legi kaj aŭdi pri la diversaj aranĝoj, eblos sendi mesaĝojn al ĉiuj kongresanoj (ĉiu ricevos propran retadreson, kiu funkcios nur dum la kongresa semajno), pridiskuti la kongresan temon kaj aŭskulti eldirojn de kongresanoj. La virtuala kongresejo funkcios ĉe la adreso www.uk-2003.net. Atentu: tiu reteja adreso ankoraŭ ne estas aktiva!

(ret-info)

**Forpaso**

Antaŭ kelkaj monatoj forpasis nia membro s-ro Santiago ALVAREZ (IKEF 307) el Kolombio. Li estis la iniciatinto de la Yahoo-listo per-esperanto-komerco.

**Usona dolaro: novaj biletoj**

Fine de 2003 ekcirkulos novtipa 20-dolara bileto. En la posta jaro sekvos novaj 100- kaj 50-dolaraj biletoj. La novaj biletoj estos pli bone protektitaj kontraŭ falsado.

**Diskutado**

cecile.sillis(a)agelev.be, membro de belga verdula partio, ŝatas diskuti pri la temo 'kunlaboro kun evoluantaj landoj'. (laŭ Aveno 26, aprilo 2003)

**Terminologio**

Bibliografio de vortaroj

Unuafoje UEA okazigis nur-elektronikan eldonon de ampleksa publikaĵo. Temas pri aktualigita "Bibliografio de vortaroj", origine kompilita de Edward Ockey en 1982.

La bibliografia listo estis enkomputiligita kaj parte ĝisdatigita de Geoffrey Sutton, sekve de kio ĝi ricevis novan titolon: "Bibliografio de vortaroj kaj terminaroj en Esperanto, 1887-2002". En ĝi estas listigitaj E-vortaroj kaj terminaroj, publikigitaj dum la tuta vivodaŭro de nia lingvo - entute 1079 titoloj. Sendube la listo ne estas kompleta, sed momente la plej plena.

La Bibliografio estas trovebla en la retejo de UEA ĉe la adreso http://uea.org/dokumentoj/bibliografioj.html kaj estas prezentita en tri formoj - HTML-versio, kiun oni povas konsulti rete, kaj PDF- kaj RTF-versioj, kiujn oni povas elŝuti kaj konsulti laŭnecese en propraj komputiloj.

En la sama paĝo oni trovas apartan Bibliografion de E-terminaroj, aperintaj en 1980-2002. Ĝi estas pli oportuna por tiuj, kiuj simple serĉas specifajn fakajn terminarojn, ĉar disponigas titolojn, ofte reale troveblajn en libroservoj. Krome, post pluraj titoloj estas aldonitaj hiperligiloj, pere de kiuj oni povas transiri al la tekstoj de la terminaroj en diversaj E-retejoj. La bibliografio estis kompilita de Ĵerom Vashe kaj enretigita de Dirk Bindmann.

(Gazetara komuniko de UEA n-ro 168, tra ret-info)

Akademia vortaro alirebla

La Akademio de Esperanto (AdE) informas, ke en la retpaĝaro ĉe: www.akademi-



o-de-esperanto.org ekzistas la labor-versio de la Akademia Vortaro, kaj ke ĝi estas plene alirebla al la publiko. Simple eniru la paĝaron kaj poste klaku sur "Akademia Vortaro" aŭ iru rekte al: http://www.akademio-de-esperanto.org/akademia_vortaro/.

La versio enhavas ĉiujn fundamentajn kaj oficialajn radikojn kun difinoj provizore prenitaj el la reta vortaro ReVo. Kvankam temas pri laborilo por la Sekcio pri Ĝenerala Vortaro, ankaŭ la esperantistoj ĝenerale povus trovi la konsultadon utila.

Renato Corsetti (tra ret-info)

# Gajnu monon per internacia komerco per Esperanto

Se vi estas entreprenema homo kaj volas havi vian propran entreprenon, sciu ke internacia komerco per Esperanto estas unika ŝanco por vi. Jam ekaperas la unuaj entreprenuloj kiuj volas fariĝi veraj entreprenistoj sur tiu ĉi kampo.

Por helpi ilian agadon, IKEF apogas la funkciadon de du diskutlistoj en interreto:

### *Teorio kaj informo pri internacia komerco*

Tiu ĉi listo celas diskutigi strategion por la evoluo de la internacia komerco per Esperanto, ellernigon de bazaj konoj pri la temo, diskonigadon de utilaj statistikoj, klarigadon de duboj de komencantoj, novaĵojn pri komerco inter la landoj de la membroj kaj similaĵojn.

### *Internacia komerco per Esperanto*

Nur por dissendo de konkretaj proponoj pri eksportado kaj importado.

La du listoj estas administrataj de brazila Instituto de Internacia Interŝango. Por aliĝi al ili unue kontaktu la administranton, pere de efe(a)redeesperanto.org.br, kaj tiam vi ricevos kaj demandaron kaj la regularon de la du listoj. Post tio, vi estos survoje al granda celo: profesia agado por internacia komerco per Esperanto.